**N I A V O Ĉ O**
**Madrida Esperanto-Liceo**
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **SEPTEMBRO-OKTOBRO 2007**

**KURSO DE ESPERANTO EN MADRIDO (VALLECAS)**

Senpaga kurso pri Esperanto, lingvo kaj kulturo. Komenco de la venonta kurso: 20 Oktobro 2007, sabate de 17.00 ĝis 19.00 en Librería Muga, Avda. Pablo Neruda, 89, 28038 Madrid (Vallecas). Kontakta telefono: 667721951.

Por pliaj informoj, aliĝu sendante sentekstan mesaĝon al la forumo: esperantovallekas-subscribe@yahoogroups.com

**BELARTAJ KONKURSOJ**

En en la internacia konkurso de UEA de 2007, laŭ la temo eseo, Toño del Barrio atingis la trian premion pro "La normala lingvo".

**TRA LA MONDO**

La Internacia Esperanto-Muzeo, fako de la Aŭstria Nacia Biblioteko, aperigis 100 **esperantajn librojn skanitajn** de la plej frua epoko de Esperanto, inter kiuj troveblas la unua gramatiko de Zamenhof.
Vidu: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm

La valencia televido Canal Nou elsendis 4 raportetojn pri la esperanta Senprograma Renkontiĝo okazinta en **Callosa d'en Sarrià** (Alakanto) meze de julio.

Nova eldono de **La Mastro de la Ringoj**, de J.R.R. Tolkien, estis premiere prezentita de la eldonejo Sezonoj en la 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio. La unua eldono, tradukita de William Auld, elĉerpiĝis baldaŭ. Zorga kontrolado fare de tri provlegantoj ebligis elsarki erarojn, kiuj estis en la unua eldono. Ses ĉapitroj kaj kelkaj aliaj tekstoj de/pri Tolkien estas legeblaj en la retpaĝaro de Sezonoj http://www.esperanto.org/Ondo/ en la rubriko “Tolkien en Esperanto”.

La 07-an de septembro 2007 en la podkasta E-elsendo de Pola Radio oni intervjuis al **Pedro Zurita**, kiu antaŭ la 92-a UK en Jokohamo partoprenis seminarion organizitan de la Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj pri enlaborigo de blinduloj. La interparolo estis la okazo ankaŭ demandi pri la profesia kariero de la antaŭmikrofona gasto, internacia aganto de la blindula movado. Pedro estas membro de HEF kiu loĝas en Madrido kaj agadas por re-eldoni esperantan lernolibron en brajlo kun la helpo de la hispana blindul-asocio ONCE.

En **Logroño** oni inaŭguris ekspozicion de fotografaĵoj de D-ro. Julián Loyola (+1957) laŭ la titolo "Un logroñés en Europa 1934-1935". La fotografaĵoj estis faritaj de D-ro. Loyola dum la Internaciaj Kongresoj de Esperanto de tiu epoko.

En septembro aperis “Beletra Almanako”, la literatura periodaĵo ĉefredaktata de **Jorge Camacho**. Jorge deklaris ke post la ĉeso de”Fonto” mankas pure beletra revuo, senpropaganda kaj sencenzura. Ĝi inkludos legindan beletron, prozan aŭ poezian, fikcian aŭ esean, originalan aŭ tradukitan.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

Post la somero la oficejo de HEF estas malfermita, kiel kutime oni atendas persone lunde inter la 17,30 kaj la 20,00 horo. Dum aliaj tagoj kaj horoj vi povas telefoni al 91 4468079 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es , sed atendu ĉar vi ricevos respondon la sekvontan lundon.

**66ª Kongreso en Palos** (Huelva). Ĝi okazis kune kun la Andaluzia Kongreso; la programo preparita de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estis abunda

kaj alloga. HEF nur programis sian Ĝeneralan Kunvenon, ĝin partoprenis 22 membroj, inter ili 6 reprezentataj kaj 3 estraranoj.

La Prezidanto informis ke oni kreis komisionon por trakti la nunajn organizajn problemojn de HEF kaj serĉi eventualajn kandidatojn por anstataŭi iujn. Pedro Hernández kunordigos tiun komisionon. Rilate tion, ni inkludas informon de la Estrarkunveno datita 2007-09-17: *Augusto, Carmen, Lupe kaj Pedro Garrote lasas siajn postenojn je la dispono de la Komisiono por trovi novan estraron. Pedro, kiel kasisto, anoncis ke li lasos la postenon en la estraro en januaro de 2009 kiam li fermos la kontojn de 2008. Por ne lasi leĝan vakuon, la nuna estraro daŭrigos sian laboron ĝis la Ĝenerala Kunveno kiu elektos novan estraron.*

**Hispana Kongreso 2008**. Okazos en **Cuenca** inter la 3-a kaj la 6-a de julio. Alejandro Pareja, Prezidanto de LKK, atendas oficialan respondon rilate kongresejon kaj malmultekostan loĝejon. La aliĝilo estos disponebla antaŭ la fino de la jaro (kotizo 30 eŭroj, 25 por HEF-anoj).

Jam oni povas legi la kolekton de "**Boletín**"-oj de Hispana Esperanto-Federacio. Bedaŭrinde mankas multaj ekzempleroj, sed eble, dank'al la helpo de malnovaj HEF-anoj kiuj zorge konservis la kolekton de aperintaj bultenoj, oni povos iam kompletigi ĝin. La malnovaj numeroj devenas el la kolekto de la Gazetoteko Lanti, al kies prizorganto s-ro. Jesuo de las Heras ni esprimas nian plej koran dankon. En la ĉefa paĝo de HEF http://www.esperanto.es troveblas dekstre la ligilo al la kolekto. En la aperanta paĝo aperas menuo kun la jaroj, ekde 1949 ĝis 2007.

Toño del Barrio, sendis al diversaj e-aktivuloj la unuajn proponojn por komenti pri la projektoj por la eventoj de venontaj du jaroj: **2008.- Internacia Jaro de Lingvoj kaj 100-a jaro de UEA. 2009.- 150 datreveno de la naskiĝo de Zamenhof**. La Estraro aprobis ke HEF kune kun Fundación Esperanto subskribos la projektojn. Provizore Lupe okupiĝos pri la rilatoj de HEF kun Fundación (Toño).

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Post la feria periodo, la konversacia-rondoj kiun organizas Madrida Esperanto-Liceo daŭriĝas ekde la 17-a de septembro, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79. Ĉiulunde okazas malferma konversacia rondo je la 18,30 **.**
**15an de oktobro: "Costa Rica, pura vido":** fotografaĵoj de la somera vojaĝo de Carmen kaj Lupe.

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid